

Prioritataj konstrulaboroj: Personoj kun Movebleco Reduktita.

Post finsolvado de pluraj urĝaj aferoj (ĉefe la risko, ke falus ŝtonoj el la frontono, la kamenoj...), kaj paralele al la esenca debato "ĉu decidi tujajn konstrulaborojn aŭ ŝpari por renovigi la tegmenton?", traktindas la plano pri kreado de unu necesejo kaj unu aŭ du ĉambroj por Personoj kun Movebleco Reduktita (PMR), pri kiu laboras, de pli ol du jaroj, konforme al leĝa devigo, la Komitato kaj la Teĥnika Komisiono (Komisiono Bonteno kaj renovigo de la Konstruaĵoj). Sed oni ankoraŭ ne disponas ĉiujn necesajn informojn por decidi kaj komenci la konstrulaborojn.

Por ne tro detaligi la aferon, ni diru resume, ke por la necesejo laŭ la normoj PMR, oni pristudis du situojn: en la lavejo, aŭ sub la verando (kie troviĝas la lavujoj). En la lavejo, necesus pli da laboroj, la aliro malpli facilus (necesus trairi la korton eĉ se pluvus), sed la konektado al la defluiloj por malpuraj akvoj venantaj de aliaj necesejoj estus pli facila. En ambaŭ okazoj, la disponebla loko estas apenaŭ sufiĉa, sed necesejo sub la verando estus ne tre konvena. Oni tamen atingis interkonsenton pri la ebleco sub la verando, kaj konstruado povos komenciĝi, laŭ instrukcioj de konstruejestro, tuj kiam ni havos la necesajn prezproponojn, enkalkulante, ke kelkaj laboroj povos esti faritaj volontule.

Koncerne la ĉambrojn por PMR: ĉar ni kapablas gastigi pli ol kvindek personojn, ni devige havu du tiajn ĉambrojn. Oni ankoraŭ hezitas inter du eblecoj: en la maldekstra kromdomo, la nuna bindejo kaj la ĉambro 33 ĉe la angulo, aŭ en la dekstra kromdomo, anstataŭ la ĉevalejo. Ambaŭ planoj havas siajn avantaĝojn kaj malavantaĝojn: Yves Couturier verkis precizan komparan tabelon, sed restas la demando, laŭ kiu proceduro oni decidu. Resume, en la bindejo, la laboroj estus malpli kostaj, krom la fakto, ke por konstrui la duan ĉambron, necesus grandaj laboroj en la ĉambro 33, kiujn oni povus fari iom poste. La spaco estas pli limigita, apenaŭ sufiĉa... kaj kion ni faru pri la panforno? Sed pli grave, la ĉambro estus malpli facile alirebla, ĉu piede ĉu veturile. En la ĉevalejo, laŭ la desegnoj de Claude Bensimon, necesus pli da laboroj interne kaj tegmente, sed la kreitaj ĉambroj estus pli vastaj, bone situantaj survoje al la salono Zamenhof. Necesus forigi ĉion, kio nun troviĝas tie, do konstrui novan metiejon (en la ĉambro 33?) kaj trovi lokon por la grandaj iloj. Krome, la defluigo de malpuraj akvoj estus malpli facila. Unuaranga demando: kioma parto de la konstrulaboroj povos esti faritaj senpage de volontuloj? Ĉar la prezproponoj de la metiistoj probable estos altaj, ĉefe se ni elektos la ĉevalejon.

Ĉar la Komitato kaj la Teĥnika Komisiono elspezis multan energion pri tiu ĉi afero, ili precize raportos dum la jarkunsido kaj priatentos ĉies opinion, kvankam tia kunsido ne estas la plej taŭga loko por tia decido. Tiu ĉi resumo celas esence prepari la diskuton kaj informi la societanojn, kiuj ne povos ĉeesti la jarkunsidon.